

Claude GACOND kun Tyburcjusz Tyblewski:
Verko ĉiam rememorigenda, *Interpopola Konduto* de Edmond Privat
Radioprelego de Claude GACOND, SRI, 1986.03.29.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-166/Radiokasedo-166-86-7-A-1033-Claude-GACOND-Tyburcjusz-Tyblewski-Verko-chiam-rememorigenda-Interpopola-Konduto-Edmond-Privat.mp3>

Cl.- Audiĝas elsendo de Svisa Radio Internacia. Hodiaŭ parolas Tyburcjusz Tyblewski kaj Claude GACOND pri la verko ĉiam rememorigenda, *Interpopola Konduto* de Edmond Privat.

TT.- En la franca versio ĝi titolis: "Ŝoko de patriotismoj" kaj tiu titolo pli esprimas la etoson de la libro. Eldonita en 1935 far Literatura Mondo en Budapeŝto, ĝi alportis al la legantaro iom ŝokan enhavon sub la pedagogie trankvila titolo. Per tia titolo Edmond Privat verŝajne intencis koncizigi la celon de sia eminente grava verko. Aparte grava por esperantistoj!

Cl.- Li mem difinis la celon: "ekzameni faktojn sur psikologia kampo ne sufiĉe atentata... Ne ofendi, sed pripensigi, jen la intenco: Kiel homoj kondutas de nacio al nacio? Kiel ili sentas are?"

TT.- Starigi tiajn demandojn signifas - atingi ekstremon, tuŝi tabuon, minaci al rutino de pritrakto. Memoru tamen, kiu estas la aŭtoro. Sciencisto kun varma koro kaj profunda interesemo, kiu per la internacia lingvo volis trabori la vandojn, kiuj dividis kaj baris. En sinsekvaj ĉapitroj de la libro ni do trovas:

- 1) Animo nacia, 2) La gento, 3) Nacia vanteco, 4) Nacia vero, 5) Homoj kaj ŝtato, 6) Homaj oferoj, 7) Ŝtato kontraŭ ŝtato, 8) Eklezio kaj ŝtato, 9) Interna memkontrolo, 10) Klasa konscio, 11) Milito kaj revolucio, 12) Popola konduto en Hindujo, 13) Neperforto en Polujo, 14) Mesianismoj, 15) Ŝtatoj en societo, 16) Kontrolo kaj protekto, 17) Akiritaj kutimoj, 18) Novaj mistikoj, 19) Konkludo.

Sufiĉas por orientiĝi, el kio li ŝpinis la tutaĵon. Anticipante la probablajn demandojn, li konstatis antaŭparole:

Cl.- "Estas tradicioj, moroj, hereditaj ideoj, kolektivaj emocioj, vasta reala mondo ne pli forgesinda ol la mondo de ciferoj. La vivo miksas ĉion... Por ekkompreni tion, kio okazas en Azio aŭ en Okcidento, necesas aŭdi, kion la homoj manĝas tie, kion ili gajnas. Necesas ankaŭ aŭdi, kion ili kreaas..."

TT.- Necesas aŭdi, scii kaj konservi la scion, por akiri la interpopolan grundon de sia mondperceptado. Tial en la menciitaj ĉapitroj (mallongeco, sed plensenseco estas ilia valorego) li liveras abundan scion, pliriĉigante la legantaron. Edmond Privat multon spertis mem. Li multe vojaĝis kaj profunde studis. Sed antaŭ ĉio li kapablis senti kaj per tiu sentado akiri la profundecon de rekono. Ekzemple el la ĉapitro "Nacia vanteco" aŭskultu la subtitolojn: Fanfaronemaj homoj kaj nacioj - Pri eskimoj kaj hotentotoj - Filoj de 1' suno - Centro de 1' mondo - Laŭdado pri sia nacio - Karikaturado pri aliaj - Naciaj himnoj - Respekto kaj blasfemo - Memlaŭdaj kantoj - Grupaj sentoj - Prestiĝa rivaleco ... Kiam oni droniĝas en la ara sentado, preskaŭ ne eblas distingi inter vero, modero kaj vanto. Komparu mem, nun, kiom ofte apud vi eksonas la orgojlaj himnoj pri grandeco de via nacio kaj saĝeco de via partio! Privat avertis pri tio, proponinte unue al franclingvanoj kaj poste al

esperantistoj, ke ne eblas renkontiĝi interetne ŝveliĝinte pro tia orgojlo. Ke en interetna kontakto necesas kompromiso: rezigni pri iom el la sia kaj respekti iom el alies etna memfido. Ĉapitro post ĉapitro vi komencas kompreni, ke multo el viaj naciaj ĝisnunaj (eĉ la plej profundaj) konvinkoj meritas almenaŭ reprimakojn kaj ofte... la modifon, se vi proklamas esti preta ne nur uzi la internacian lingvon, sed ankaŭ vivi akorde kun intereso de la homaro, en kiu vi bonŝancas ekzisti.

Cl.- "Kio interese elstaras - konstatas la aŭtoro - el la duonjarcenta sperto pri Esperanto, tio estas la nova mistiko aŭ ara sento, kiun ĝi disvastigas sur la kampo de interpopola toleremo kaj etiko... Fakte ĝi estas multe pli originala kaj rimarkinda kiel elemento de tuthomara patrujamo, kiu respektas la nacian senton kaj ne naskiĝis el antagonismo. Tio estas la neŭtralismo, ofte mokata de revoluciuloj. Ĝi entenas ĝuste tiun amikeman mistikon - senkoleran kaj senmalaman..."

TT.- Ŝajnas neniam sufiĉe memorigi la cititan opinion. Rigardu ĉirkaŭen hodiaŭ! Kiom ofte ne nur en la difinita ŝtato, sed en ŝajne neŭtrala loko, kie partoprenas nur uzantoj de la internacia lingvo, la komunan spacon penetras indigno, kolero, agreso kaj kondamno pro antaŭjuĝoj. Tiu elementa manko de toleremo ĉe kelkaj esperantistoj estas kvazaŭ signo, ke ili ne atingis sufiĉan ŝtupon de la evoluo, se ili scipovas kunporti al la interetna renkonto nur stereotipajn juĝojn laŭ eterne aplikataj kriterioj. Edmont Privat atentigas pri tiuj danĝeroj kaj emfazas por senkolera neŭtralismo. Ankaŭ ĉi tiun nocion ne ĉiuj komprenas sufiĉe kaj des pli - ne scipovas apliki ĝin en praktika vivo. En kondutoj de ne malmultaj ĝi manifestiĝas kiel indiferenteco rilate aferojn gravajn por aliaj. Lerni praktiki ĝin oni povas inter esperantistoj.

Cl.- "La sperto pri Esperanto kuŝas en tio, ke ĝi ebligis disfloriĝon de tiu fluganta sento, kiu bezonis esprimilon. La naskiĝanta kredo je unueco en diverseco, la homaro ekkonscia pri si mem samtempe fidela al la naciaj valoroj, riĉaj je ĉarmo kaj koloro, jen tio, kio donis al Esperanto flugilojn kaj karakteron..."

TT.- En sekvantaj semajnoj Svisa Radio Internacia prezentados sabate literaturajn elsendojn, dum kiuj la literaturaj fenomenoj de esperantista kulturo trovos sian respeguligon. Nia intenco estas ne nur informi kaj komentarii aŭ pritaksi valorojn de la verkoj, sed elektadi el la abunde liverataj ĉefe tiajn, kiaj konvenas al la koncepto de interpopola konduto. Iom arkaika laŭ sia etimologio, la nocio perdis nenion el sia aktualeco. Sufiĉus ja modifi ĝin en "interetnan konduton" kaj jam multaj el ni pli komprenus, kion antaŭ 50 jaroj proponis Edmond Privat. Ni tamen intencas resti ĉe lia difino, agnoskante ĝian originalecon.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Parolios Claude Gacond parolis Tyburcjusz Tyblewski kaj Claude GACOND. Ĝis la venonta sabato!